

Sud-Rejna Kuriero

Februaro
2015

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°57

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

*Iom malfrue aperas ĉi-tiu
februara numero. Pro personaj
familiaj problemoj, mi ne estis for
de mia hejmo dum pli ol 2
semajnoj.*

*En decembro okazis la
Zamenhof-festo en Bazelo, tre
bone organizita de la tiea grupo. Ni legos raporton pri ĝi.*

*Komence de januaro okazis nia 3-reĝa festo en Espace 110. Ĝi
estis la unua renkontiĝo en la nova jaro.*

*Komence de aprilo okazos la regiona staĝo de Esperanto-
France-Est en Verdun. Samloke kaj samtempe okazos
SAT-Amikara Kongreso. Profitu la pli favoran aliĝkotizon antaŭ la
unua de marto.*

*Nia Ĝenerala Asembleo estis prokrastita, tial vi legos raportojn
pri ĝi en la venonta numero. Tamen nia sekretario jam verkis la
agad-raporton pri la jaro 2014.*

*Sur la lasta paĝo ni povas ĝui la bondezirojn de Bernard, eĉ se
iom malfrue.*

***Eĉ malfrue
Feliĉan kaj sano-
plenan jaron 2015***

André Grossmann

- Ĵaŭde 25.01.2015 Ĝenerala Jarkunveno**
- Lunde 23.02.2015 Verda Fadeno en la Poste en Saint-Louis aŭ al la karnavalo en BS**
- Ĵaŭde 26.03.2015 Skrablo kaj babilado**
- Lunde 27.04.2015 Verda Fadeno en la Poste en Saint-Louis**
- Ĵaŭde 28.05.2015 Kunveno en la Grün 80 aŭ en la greka restoracio en Inzlingen**
- Lunde 29.06.2015 Verda Fadeno en la Poste en Saint-Louis**

FERIOJ**08.2015****09.2015****10.2015****11.2015****12.2015****Zamenhofa festo en Germanio**

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahoo.fr

Por babili en Esperanto ni uzas jenan dissendoliston:

verda-babilejo@googlegroups.com

Enskribiĝo: verda-babilejo+subscribe@googlegroups.com

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2015-2017

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivajn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono	Kolora ekzemplero
2015	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	14 eŭroj
2016	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	
2017	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	

Vor Kurzem konnten wir hautnahe erleben, wie zu allgemein dieser Satz verstanden wird :

Vor einiger Zeit haben wir das Elternhaus meines Mannes in der Nähe von München übernommen. Wir mieten die Zimmer an Studenten, denn es ist sehr schwierig für Studenten, überhaupt eine Bleibe zu finden und außerdem müsste das ganze Haus renoviert werden, wollte man es als Ganzes vermieten.

So haben wir ein sehr internationales Haus, da sich ergeben hat, dass ein Chinese mit Freundin, ein Ukrainer und ein Inder zusammentrafen und gut miteinander zusammen leben, fast wie im Film „L'auberge espagnole“.

Unser indischer Student ist der letzte, der dazu gestoßen ist. Nach einem Architekturstudium hat er sich neu orientiert und zur Informatik gewendet, was anscheinend relativ einfach ist. Bei manchen indischen (übrigens auch bei manchen chinesischen) Universitäten ist die Ausbildung so vielseitig, dass ein solcher Wechsel problemlos ist. Und so war es auch.

Antaŭ nelonge ni spertis mem, kiom ĉi frazo tro supraĵe komprenatas:

Antaŭ iom da tempo ni transprenis la gepatran domon de mia edzo en Munkeno. Ni ludonas la ĉambrojn al gestudentoj, ĉar por gestudentoj malfacilas trovi restadejon kaj krome necesus komplete renovigi la domon, se oni dezirus ĝin ludoni entute.

Tiel ni havas ege internacian domon. Tie renkontiĝis ĉino kun sia amikino, ukraino kaj hindo kaj ili kune agrable tie vivas, preskaŭ kiel en la filmo „L'auberge espagnole“

Nia hinda studento estas la lasta alveninto. Post studo pri arkitekturo, li reorientiĝis kaj sin turnis al informadiko, kio ŝajnas relative simpla afero. En iuj hindaj kaj cetere ankaŭ en iuj ĉinaj universitatoj la instruado estas tiom diversfaka, ke tia ŝanĝo senproblemas. Kaj tiel estis.

In relativ kurzer Zeit hat er schon recht gut Deutsch gelernt, zumal er ohne Sprachkenntnisse nach Deutschland kam. Dennoch, als er sich für eine Stelle - wohlge-merkt in der IT-Branche - bewor-ben hat, wurden seine ungenü-genden Deutschkenntnisse be-mängelt, wo doch in dieser Bran-che Englisch die oberste Priorität hat.

Das letzte Wort ist noch nicht gesprochen. Er hat zwar noch keine endgültige Absage erhal-ten, aber er war nicht sehr opti-mistisch, weil auf das Deutsche so viel Wert gelegt worden ist.

Solche Situationen kommen im-mer öfters vor und bei nicht aus-gesprochen englischsprechen-den Großkonzernen werden an-dere Sprachen durchaus erwar-tet. Mehrsprachigkeit ist also ge-fragt !

Post relative mallonga tempo li jam sufiĉe bone lernis la germanan, kvankam li venis al Germanio sen kono de la germana. Sed kiam li kandidatis por laborposteno – kompreneble en la fako informteknika – oni riproĉis al li la nesufiĉan regadon de la germana lingvo, eĉ se en ĉi fako la angla ja prioritatas.

Ĝis nun nenio estas decidita. Li ja ne ricevis definitivan rifuzon, sed li ne tre optimismis, ĉar oni tiom insistis pri la germana.

Tiaj situacioj sin prezentas pli kaj pli ofte kaj en ne ekskluzive anglalingvaj egaj koncernoj an-kaŭ aliaj lingvoj estas postula-taj. Do plurlingvismo estas pe-tata!

Nova ludo por iPad tute en Esperanto :

2015-01-27 19:36

Ludisto, la firmao de Chuck Smith, kiu interalie ellaboris la unuan veran Esperantan klavaron por iPhone, nun publikigis novan iPad-ludon por du ludantoj, tute en Esperanto.

Laŭ lia sperto la ludo povas facile populariĝi ĉe Esperanto-kunvenoj.

Por legi pli ==> <http://www.liberafolio.org/2015/nova-ludo-por-ipad-tute-en-esperanto>

Agad-raporto de Mulhouse-Espéranto por la jaro 2014

Kursoj por progresantoj okazis ĉiu-semajne, plejofte vendrede en Espace 110. La nombro de la gelnantoj variis inter 5 kaj 2.

La kunvenoj "verda fadeno" regule okazis alterne en Mulhouse kaj St Louis la lastan lundon de ĉiu monato. Ankaŭ partoprenis membroj el Bazelo. Nun estas 13 personoj enskribitaj en la dissendo-listo verdebabilejo.

En la 10a de januaro okazis la tri-reĝa festo. Ĉiuj povis gustumi la tortojn (4!) kaj la vinon !

La Ĝenerala Membro Kunveno okazis la 31an de januaro en espace 110.

Nia regiona staĝo okazis en Storckensohn je la 4 – 5 - 6aj de marto. Partoprenis 46 personoj. Okazis prelegoj (aparte de Hannes Larsson), kaj Mélanie koncertis kantante je sabate vespere.

En majo, junio kaj julio (en tute dekfoje) kelkaj membroj deĵoris ĉe "Vivu via strato". En ĉiu dimanĉo matene, ĉe la bordo de l'Ille okazis la festo. Okazo por multaj babiladoj kun scivolemaj pasantoj.

La 14an de junio okazis la amika tago kaj komuna manĝo de nia asocio. Ni vizitis parton de la urbo gvidita de Jacques Pineda, kiu elvokis la miluzan laboristan historion. Poste ni tagmanĝis paeljon en la restoracio Le Printemps.

Pluraj membroj de la asocio partoprenis al la 36a Bavelo-seminaro en Sankt Peter je la 17 – 18 – 19aj de oktobro.

La 15an kaj 16an de novembro ni partoprenis en Bédéciné en Illzach kaj samtempe en Ungersheim ĉe foiro pri ekologio kaj justa komercado.

Partoprenis ankaŭ membroj de nia asocio al :

- la UK semajno en Argentino
- la Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj turismo en Cap-Salou, Katalunio

En oktobro Jacques sukcesis iniciati kursojn por komencantoj en "Maison du Temps Libre" kaj ankaŭ ĉe la "Mondcivitanoj".

SRK aperis 4 foje.

Nia retejo <http://mulhouse.esperanto.free.fr> daŭre bone funkciiis.

Niaj dissendo-listoj por facile komuniki:

- mulhouse-esperanto@yahogroupes.fr
- verdababilejo@googlegroups.com

Yves Stutz

Verdaj fadenoj por amike babilo nur en Esperanto



La 26an de januaro okazis la unua verda fadeno en 2015.

Certe la vetero influas la nombron da partoprenoj. En tiu tago ĝi ne estis favora. Fernando montris al ni la specialajn horloĝojn kun esperanto-surskriboj. En posta paĝo estas klarigoj pri ili.

La venontaj verdaj fadenoj estas jene planitaj:

23an de februaro en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis

30an de marto en Mulhouse en la kafejo Le Printemps, rue du Printemps.

27an de aprilo en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis

18an de majo en Mulhouse en la kafejo Le Printemps, rue du Printemps.

29an de junio en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis.

Zamenhof-tago en Bazelo la 13an de decembro 2014.

Laŭ-vice niaj Zamenhof-festoj okazas en la tri landlimaj landoj, Svislando, Germanio, Francio. Ĉi-jare la grupo de Bazelo transprenis la organizadon. Same kiel Jacques jam iniciatis last-jare ĝi komenciĝis matene je la 11a.

La rendezuo estis ĉe la ĉef-pordo de la preĝejo Claraplatz en Bazelo. Iuj atingis la lokon per tramo, aliaj per propraj aŭtoj. Surloke ni renkontiĝis kun samideanoj el Frajburgo, Bazelo kaj Miluzo, Saint-Louis.

Nicole Bérout akceptis la alvenintojn kaj zorgis pri la ĉeesto de ĉiuj. Poste ni piede atingis Muzikmuzeon (Drehorgel).



Alveno ĉe Claraplatz

Ĝi ne estis tiom granda, sed plena je plej diversaj muzik-aŭtomatoj. Pri kiuj ni ricevis interesajn klarigojn, rilate al ilia historio, la akiro de la instrumentoj. La gvidanto volonte kaj tute pasie funkciigis ilin por ke ni povu ĝui la muzikaĵon,



Eleganto muzik-aŭtomato kaj meblo

senti la muzikan etoson kaj krome ankaŭ admiri la mekanismon.

Estis pluraj gurdoj, kiuj bezonis esti manipulitaj per kranko. Aliaj pli aŭtomate funkciis helpe de tru-bendoj. Ankaŭ eblis admiri ege elegantojn muzikilojn, siatempe rezervitajn al riĉaj familioj. Ili funkciis kun ege agrabla sono.

La gvidanto aparte fieris pri sia klaŭno "Charlie", kiu tre elegante cimbalis kaj tamburis movigante manojn kaj kapon





Jen la simpatia klaŭno "Charlie", kiu ĉarme muzikis por ni kaj salutis nin

Ĉiuj estis ravitaj pro tiu agrabla vizito al interesa muzeo kaj dankas la organizantoj pro tiu bona elekto.

La posta celo estis la restoracio Saigon Palast en Weil/Haltingen en Germanio.

Tie estis rezervita granda tablo por nia festo Ĉiuj ricevis sian tereron laŭ jam antaŭe rezervita menuo.



Post la manĝo estis ebleco prezenti bildojn. Mi prezentis fotojn pri la akvofaloj de Iguaŝo en Argentino kaj Brazilo.

Mireille Grosjean prelegis pri la diversaj eblecoj uzi tualetejojn kaj necesejojn en multaj landoj tra la mondo.Ŝi donis tre interesajn informojn, ne nur pri la ejoj sed ankaŭ pri la kutimoj kaj eĉ la rekomendoj.

Refoje ni pasigis tre agrablan Zamenhof-tagon en agrabla kaj simpatia Esperanto-etoso.

Dankon al la organizantoj.



Tri-reĝa festo en Espace 110

La 9an de januaro 2015 okazis nia unua kunveno en la nova jaro ĝuste por festi la tri reĝojn.

Ĉi-foje venis nur membroj de nia asocio. Komence nur 4, poste ankaŭ venis Edmond kun Fernando.

Certe 4 migdalo-tortoj estis tro por tiom malmulta partoprenantaro. Tial fine ekestis nur 2 reĝoj, Andreo kaj Fernando.



Krome ankaŭ abundis boteloj da blanka vino.

Malgraŭ tio, viglis la diskutoj ĉefe pri la Esperanto-Tago, kiun Roberto planas organizi komence en venonta oktobro en Mulhouse kun la helpo de Jacques.

Tiel komenciĝis por nia grupo la nova jaro 2015, kun novaj planoj en agrabla kaj simpattia etso.



Esperanto-horloĝoj

S-ro Fernando KINKANI N'KANU el Colmar proponas akiri tian unikan horloĝon, kun mencioj pri Esperanto sur la antaŭa kaj dorsa flankoj.

Ni proponas al vi sendi minimume 10 eŭrojn kaj eventuale 2 eŭrojn por la sendkostoj.

Jen kion skribas Fernando.



Karaj gesamideanoj saluton kaj bonan novjaron 2015,

La asocio Eŭro-Afrika Solidareco disvendadas la specialajn horloĝojn por esperantisto je minimume 10 eŭroj, sed eblas sendi pli multe plus la sendkoston. Tio sumo helpas la asocion plenumi sian projekton de la konstruado de lernejo en Angolo/Afriko kun la kunlaboro de TAKE-Esperanto. Aĉetu tiun horloĝon estas partopreni al la progreso de Esperanto en la mondo, ĉar la horloĝo havas bildon de la asocio Eŭro-Afrika Solidareco (personoj kun diversaj koloroj sin tenas manon kun mano en la mondo) por montri la solidarecon de esperantistoj malgraŭ iliaj diversaj koloroj, kulturoj, religioj kaj landoj, ili kunlaboras.

Ankaŭ ĝi havas la verdan steleton, kiu gvidas nin. Malantaŭe, ĝi havas la skribon "Speciala horloĝo por Esperantisto" kun la bildo de ZAMENHOF kaj lia naskiĝdato kaj forpasdato. Sidejo en Colmar.

La personoj kiuj interesiĝas povas ĝin mendi al la adreso de la kasisto de Mulhouse-Esperanto S-ro André Grossmann aŭ al la adreso de S-ro Fernando KINKANI N'KANU, 4, rue d'Amsterdam 68.000 Colmar, telefono 0623188876 Membro de Eŭro-Afrika Solidareco kaj TAKE-esperanto
Kore dankas FK

En 1466 Miluzo jam de longe imperia libera urbo sine de la ĝermana imperio sin proklamis aŭtonoma respubliko. Kompreneble tiun unuflankan decidon tro ŝatis nek la ĉirkaŭaj nobeloj (kies plimulto estis jam forpelita de la urbo) nek la habsburgoj (ĉiam timantaj perdi influon sur la Rejna dekstra bordo. Do ĉiuj tiuj malamikoj atendis la plej malgrandan pretekston, por re-proprigi al si la urbon. Ĝi estis rapide trovita:

Miluzo muelisto (tio klaras) de la Bazela pordo forgesis re-doni 6 pruntedonitajn denarojn. La pruntedonisto Hermann Klee najbara nobelo tiam ekpensis, ke sonas la sorto de la juna respubliko. Jen deklarita la tiel nomata "milito de la ses denaroj" (sechs plappertkrieg en la germana). Klee amasigis la lokajn nobelojn kaj kelkajn habsburgajn urbojn inter ili Ensisheim kaj Reguisheim: unu sufiĉe imponan armeon, kiu forte maltrankviligis Miluzon kiu siavice petis helpon de la najbaraj Svisaj kantonoj.

Miluzo kaj liaj aliancanoj rapide venkis. Samtempe aliaj urboj panikante pro la Miluzo "blietzkrieg" tuj proponis ilian servon al la venkisto, kaj sukcesis kapti Hermann Klee, kiu laŭ la tiama kutimo estis pendumita sur publika placo. Sed Miluzo daŭrigis sian venĝon, disrabante ĉiujn urbojn kiuj rifuziis flankiĝi al ĝi. Eĉ Frederiko la tria imperiestro de la sankta ĝermana imperio ne sukcesis haltigi la respublikanojn.

Tiam Frajburgo Neŭenburg kaj Brisach alianciĝis al la Aŭstria landvogt Thyring por organizi novan armeon, kiu sieĝis Miluzon. Sed unu fojon plian la svisa kunfederacio ekkuris helpi la baldaŭ fariĝontaj "eternajn amikojn". Venkinta la koalicionon, Miluzo kaj la Svisanoj denove trafis la tutan Alzacon kaj la Nigran Arbaron per fajro kaj sango.

Fine post du teruraj militaj jaroj, la 18an de aprilo 1468, Sigismondo de Aŭstria nome dela koalicio devis subskribi la pacan traktaton de "waldhut" kie Miluzo trudis siajn tutajn postulojn. Tiu ridinda milito kostis ja pli ol ses denaroj, kaj memorigas nin, ke dum la mezepoko la homa vivo ne multe valoras, kaj la nobeloj ne multe havis por fari, krom atendi bonan okazon por batali. Sed ĉu hodiaŭ la mondo vere ŝanĝiĝis. . . . ? Ha! mi forgesis la klaŭzojn de la traktato de "Waldhut": Miluzo konservis sian respublikon kaj Sigismondo devis monkompensi la urbojn kaj la loĝantarojn perfortitajn. Triumfo por Miluzo? Eble, sed forta streĉo longe restadis inter ĝi kaj la aliaj regionaj urboj. Oni de tre longe alnomas la Miluzanojn "wakkes" (stratbuboj): ĉu tiu aĉnomo devenas de la milito de la ses denarojn?

Jacques

Bavelo-Kalendaro 2015

Marto 2015

- 09.-13.03. Herzberg
Esperanto-Bildungsurlaub (Pedagogia Klerigado)
- 21.03. La Chaux-de-Fonds (CH)
Studsabato de CDELI

Aprilo 2015


- 01.-07.04. Brusson (I)
Internacia Junulara Festivalo (IJF)
- 03.-10.04. Winterberg
31-a Printempa Semajno Internacia (PSI)
- 03.-05.04. Verdun (F)**
75-a Regiona Staĝo de Esperanto France-Est
kaj BAVELO:
- 03.-07.04. Verdun (F)**
Sat-amikaro kongreso
- 15.-19.04. Wrocław (PL)
Ekumenaj Bibliaj Tagoj (kun Adoru)
- 17.-25.04. Baugé (F)
4-a PRINTEMPaS en Grezijono
- 18.04. Karlsruhe**
Esperanto-Tag mit BAVELO-Jahreshauptversammlung

Majo 2015

- 02.05. Aalen
BAVELO-Wanderung mit B. Eichkorn, Jakobsweg bei AA
- 13.-17.05 Bad Mündler Printempa BARO 2015
- 15.-17.05. Herzberg
69-a Studsesio (Pedagogia Klerigado)
- 22.-25.05. Hameln **92. Deutscher Esperanto-Kongress**

Jubio 2015

- 03.-07.06. Goisern (A)
„Blue floras la genciano“ la 11a - kaj lasta!
- 13.06. Remiremont (F)
Amika Tago Freiburg-Gérardmer
- 27.06. Stuttgart**
BAVELO-Vorstandssitzung
- 28.06.-06.07. Roskilde (DK)
Roskilde Festivalo 2015



esperanto

France-Est

**En amikaj rilatoj
kun BAVELO
invitas vin al la :**

**77a Regiona Staĝo de Esperanto
la 3 - 4 - 5ajn de aprilo 2015
en Collège Saint-Jean
73 rue de Blâmont, 55100 VERDUN**

Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en Verdun samtempe kun la kongreso de SAT-Amiko. Tiel ni povos ĝui pri iuj komunaj programeroj, distraj vesperoj, turismado en Verdun aŭ al Batal-kampoj.

La surloka organizado estas prizorgata de s-ino Catherine Kremer, profesia turisma gvidantino.

Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Guillaume Armide



Guillaume Armide

***Ostejo Douaumont sur
la batalkampoj***



Por pliaj informoj :
 catherine.kremer57@gmail.com
 Tel. 03.29.85.05.09
 poŝtel. 06.02.13.01.32

Daŭre aktualigitaj informoj:
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr>

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.



Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

ALIĜOJ	antaŭ la 1a de marto 2015	ekde la 1a de marto 2015
Ĉef-aliĝanto abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio	20 €	25 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	15 €	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	2 €	4 €

Tranoktado en plurlitaj ĉambroj de collège Saint-Jean

Tranoktado en plurlitaj ĉambroj: 8 € Lito-tuko: 4,30 €

Mantenmanĝo: 3 € Manĝo en la memservejo: 8,50 €

Eblas rezervi hotelo-ĉambron en Hotel du Tigre pagenda en la hotelo mem

Individua ĉambro	kun 2 litoj	kun granda lito 2 pers.	Mantenmanĝo
50 eŭroj	66 eŭroj	56 eŭroj	7,30 eŭroj

En Verdun: la staĝejo kaj la hotelo du Tigre



Aliĝilo por la **77a Regiona Staĝo de Esperanto** en Verdun la **3/4/5ajn de aprilo 2015**

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ- kotizo	Elektita kurso
1	ĉef-aliĝanto				
2	kun-aliĝantoj				
3					

Adreso

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la doku-
mentoj disdonataj dum la staĝo (signu)

Mi preferas vegetaran
manĝon (signu)

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: €
per ĉeko per ĝiro al André Grossmann CCP 319 34 U Strasbourg
per internacia ĝiro al nia peranto en Germanio
Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj en collège Saint-Jean	Vendrede 3	Sabate 4	Dimanĉe 5	Lunde 6
Tagmanĝo				
Vespermanĝo				
Tranoktado en "Collège Saint-Jean": nombro da personoj				

Lito-prefero: individua lito duobla lito

Ĉambro-prefero en 3-persona 4-persona 5-persona

Mi preferas tranokti en hotelo kaj petas rezervadon en Hôtel du Tigre:

Individua ĉambro 2-lita ĉambro
ĉambro kun granda lito por 2 personoj

Matenmanĝo nombro da personoj

Mi / Ni deziras partopreni dimanĉe posttag-
meze la ekskurson al batal-kampoj (25 €)

Provizora Programo:

Vendrede 3-an de aprilo 2015

- 17a Akcepto de unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti
- 19a30 Vespermanĝo
- 21a45 Prezento de diapozitivoj

Sabate 4-an de aprilo 2015

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Vizito al la malnova urbo
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de pliaj alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, B, kaj C.
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero:
Guillaume Armide
- Knajpo

Dimanĉe 5-an de aprilo 2015

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, B, kaj D
- 12a30 Tagmanĝo
- 14a Ekskurso al la batal-kampoj per buso kun ĉiĉeronado (25 eŭroj)

KURSOJ

A: Komencantoj (débutants)

Cours pour débutants par Ginette Martin. Elle apportera le matériel adéquat.

B: Progresantoj

Gvidas Roberto Kueny

C: Paroliga kurso tute en esperanto.

D: Seminario:

Rodica Todor el Rumanio prelegos pri diversaj temoj rilate al Esperanto aŭ al Rumanio.

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

André Grossmann
5, rue des Pyrénées

68390 BALDERSHEIM

Ĉekoj nome de: André Grossmann
CCP 819 34 U Strasbourg

Internaciaj ĝiroj al: IBAN:

André Grossmann
FR6920041010150081934U669

BIC: PSSTFRPPSTR

Por Germanio al nia peranto:

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.
(menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:

918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA
Ludwigshafen

Pliaj informoj ĉe Catherine Kremer:

catherine.kremer57@gmail.com

Tel. 03.29.85.05.09

poŝtel. 06.02.13.01.32

Rodica Todor, prezidantino de IFEF (fervojistoj), jam prelegvojaĝis tra Francio. Okaze de Esperanto-semajno en Katalunio, ŝi lerte gvidis konversacian kurson.



97. Espéranto ET bilinguisme

Publié le 2 janvier 2014

L'espéranto est une langue internationale dont le but est de faciliter l'échange entre citoyens du monde. Comment? Par une acquisition rendue la plus facile possible grâce à l'invention d'une syntaxe simple. Le second avantage de l'espéranto, c'est que son emploi n'est pas conditionné par des rapports de domination économiques ou politiques (comme le sont l'anglais et le français dans une bien moindre mesure).

Ce n'est évidemment pas dans le but de faire disparaître les différences, par une quelconque volonté d'uniformisation qu'Albert Jacquard (auteur de l'éloge de la différence), par exemple, préconise l'apprentissage de l'espéranto à l'école. Ce n'est pas contre l'anglais non plus ni la francophonie ou les langues régionales.

Ce n'est pas non plus l'esprit de Gilbert Dalgalian, linguiste, spécialiste de l'éducation bilingue précoce, militant du multilinguisme, de la diversité linguistique la plus large, en passant par la préconisation de l'emploi de la richesse que constituent les langues régionales à l'école. Il a soutenu pourtant l'action d'Albert Jacquard.

Alors comment et pourquoi l'espéranto peut-il être un outil performant d'un point de vue linguistique?

Grâce à sa simplicité; il permet à tous ceux qui n'ont pas eu la chance d'avoir une éducation bilingue précoce, de pouvoir acquérir facilement une seconde langue à vocation de communication internationale. La généralisation de son apprentissage permettrait à une grande partie de la population mondiale, d'échanger, de partager sans avoir recours à un traducteur. Bien sûr, la maîtrise de l'espéranto (comme c'est le cas pour les autres langues) serait d'autant plus facilitée que les apprenants bénéficient déjà au départ d'une éducation bilingue précoce (soit 70% de la population mondiale).

Quant-aux plus petits? Le Professeur Dalgalian, dans ses préconisations soutient que le bilinguisme familial doit être encouragé quand les parents sont locuteurs naturels de deux langues différentes, que l'enseignement scolaire doit tenir compte -pour faire bénéficier les enfants des avantages du bilinguisme précoce- des langues de proximité (anglais, allemand, italien), des langues d'immigration, de l'opportunité formidable qu'offrent les langues régionales, et de la proposition d'un bilinguisme français-autre langue pour "les enfants de Romorantin". Cette autre langue acquise en éducation bilingue précoce pourrait-elle être l'espéranto? Les liens ci-dessous plaident en sa faveur.

Résumons:

- Pour les unilingues (qui en feront un apprentissage tardif, donc), c'est une langue assez facile. Si l'anglais est rarement bien maîtrisé, malgré les cours au collège et au lycée par ceux qui ont "subi" une éducation précoce unilingue-c'est souvent le cas en France- l'espéranto, lui, le sera d'avantage.

- Pour les petits chanceux que l'environnement familial ou régional a permis de rendre bilingues précoces, l'acquisition de l'espéranto dans un deuxième temps (ou, très tôt, en éveil) ne posera aucun problème et il prendra place facilement auprès des autres langues choisies par l'enfant ou ses parents. C'est la situation idéale.

- Pour les petits en âge de recevoir une éducation bilingue précoce (avant l'âge de sept

ans, donc) mais qui n'ont pas dans leur environnement familial, régional, la chance d'être en présence d'une diversité linguistique, l'espéranto pourrait être la solution idoine.

Conclusion, l'espéranto ne s'oppose pas à la diversité linguistique et culturelle. Fut-elle incarnée par les derniers locuteurs d'une langue si maltraitée qu'elle risque d'enfuir avec sa mort prochaine, une richesse de l'humanité. D'une certaine manière, en s'émancipant des rapports de domination, il peut participer au sauvetage de bon nombres d'idiomes magnifiques.

La généralisation d'un espéranto uniformisant n'est pas à craindre. Les scandinaves parlent anglais et quelques langues régionales sans que ne soit mise en péril le moins du monde leurs langues vernaculaires principales. Un espéranto niveleur (qui se créoliserait, d'ailleurs) est illusoire. D'ailleurs, personne ne songe à en faire un instrument culturel de pouvoir pour soumettre une quelconque population du monde. Ni le français ni les langues régionales reconnues dans la constitution, ni les langues d'immigration n'ont à craindre de l'espéranto tel que le défendent ses promoteurs. Le danger vient d'autres façons d'instrumentaliser les langues, sans doute.

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj dum ĉiuj sezonoj, kun E-kursoj kaj aliaj aktivaĵoj:

- 2015-apr-03/08: Renkontiĝo de Interkant' kaj kunkantado kun La Kompanoj - gresillon.org/spip.php?article140
- 2015-apr-17/25: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut - gresillon.org/printempas
- 2015-apr-25/26: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) - gresillon.org/printempas
- 2015-jul-20/25: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso - gresillon.org/s2
- 2015-aŭg-01/08: Lingva semajno, Lingvofestivaletto, tuj post UK - gresillon.org/s3
- 2015-aŭg-08/16: Festa Semajno por infanoj kaj familioj - gresillon.org/s4
- 2015-oktobro-17/25: AŬTUNE, lingva seminario kun Christian Rivière k.a. Jara agendo/kalendaro en gresillon.org/agendo

Nova ludo por iPad tute en Esperanto :

2015-01-27 19:36

Ludisto, la firmao de Chuck Smith, kiu interalie ellaboris la unuan veran Esperantan klavaron por iPhone, nun publikigis novan iPad-ludon por du ludantoj, tute en Esperanto.

Laŭ lia sperto la ludo povas facile populariĝi ĉe Esperanto-kunvenoj.

Por legi pli ==>

<http://www.liberafolio.org/2015/nova-ludo-por-ipad-tute-en-esperanto>

Nia Kalendaro 2015

Januaro 2015	9 - 16 - 23 - 30	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a30 ĝis la 17
	5 - 12 - 19 - 26	Esperanto-kurso por komencantoj en Maison du Temps Libre en Mulhouse lunde de la 14a30 ĝis la 15a30
	9	Ni kune festu la 3-reĝojn en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a.
februaro 2015	6	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 17a ĝis la 18a30 (nuligita)
	6	Nia grupo Mulhouse-Esperanto kunvenas por la Ĝenerala asembleo en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a (prokrastita)
	13-20	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a30 ĝis la 17 (nuligita)
	23	Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en restoracio "de la poste" 10 strato de Huningue en Saint-Louis.
	2-9-16-23-30	Esperanto-kurso por komencantoj en Maison du Temps Libre en Mulhouse lunde de la 14a30 ĝis la 15a30
marto 2015	13-20-27	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a30 ĝis la 17
	2-9-16-23-30	Esperanto-kurso por komencantoj en Maison du Temps Libre en Mulhouse lunde de la 14a30 ĝis la 15a30
	30	Lunda verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du Printemps Mulhouse

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Akvarelo reproduktita kun la afabla permeso de S-ro Georges RATKOFF.

En 2015 ni povus eĉ pli
 eniri en amikecon kun ni mem,
 la aliaj, la naturo, la destino
 kaj ĉiuj aferoj kiaj ili estas.
 Kun dankemo ni unue esploru,
 kio estas bela, bona kaj boneca.
 Ni akceptu la ĝojojn, kiuj prezentas
 sin, precipe la plej simplajn.



Ni ĝuu la atingebajn plezurojn
 sed sen noci al ni kaj aliaj.
 Pensi, diri kaj fari,
 kio veras, bonas kaj utilas.
 Ni laboru pri nia interna paco
 kaj ni malfermiĝu al la feliĉo.
 Singarde, fide, serene kaj konvinke,
 ni lasu nin gliti en la novan jaron.



Odette kaj Bernard Behra